

TEA-BULTENO

15^A JARO

MARTO - APRILO 2012

NUMEROJ 3-4

La sola plej grava afero kiu restos, post nia elmondiĝo, estos la spuroj de la amo kiujn ni postlasis.
(Albert Schweitzer - kuracisto, misiisto, orgenisto - 1875-1965)

Jara Asembleo de TEA la 26^{an} de februaro 2012

Estimataj Asocioj, karaj Gemikoj!

Antaŭ du tagoj ni estis en tiu ĉi saloneto por celebri la Tagon de la Patrino Lingvo. La saloneto estis plena, kvankam precipe pro partopreno de pluraj gastoj. Estis gastoj por kunlabori en la programo, estis gastoj inter la publiko. Indas menci la ĉeeston de la Ĝenerala Konsulo de Kroatio en Triesto akompane de la alia Konsulkunlaboranto, kaj notindas, ke ili eltenis la tutan programon, eĉ restis iom pli longe, babilante en amika etoso. La reprezentantoj de Kroatio en nia urbo venis, ĉar du el la prelegintoj venis el Zagrebo kaj estis, eĉ bone, konataj de ili. Tutcerte koincidoj kaj bona programo ludis gravan rolon, tamen ilia partopreno estis ja signo de atento kaj estimo.

Similajn vesperojn mi ŝatus havi ĉi tie de tempo al tempo, iom pli ofte, kaj kun pli nombra partopreno de niaj asocioj.

Sed, kial mi citas nun ion okazintan en la jaro 2012, kiam mi devus raporti pri okazintaĵoj dum la jaro 2011? Respondo facilas, se oni iom pli akurate trafolumos la memorojn pri la pasinta agado, ne nur de la lasta jaro, sed de la "lastaj jaroj", kaj se oni ekzamenos, de pli proksime, la grandajn klopodojn faritajn por malmergi nian Asocion el la urba kultura vivo.

Pasintjare nia agado ne estis riĉa, nenian eventon ni realigis, sed nia laboro estis konstanta en informado, en partopreno en diversaj aranĝoj organizitaj de aliaj asocioj, en rilatoj kun diversaj instancoj, en apero ĉe

kunvenoj kaj rendezuoj por ricevi informojn pri diversaj eblecoj kunlabori, por flegi rilatojn, por montri al la multnombra triesta Asocio, ke ni ekzistas, ke ni okupiĝas pri interesaj kaj valoraj projektoj. Tio donis kaj donas fruktojn, tamen komprenu, ke tiuj fruktoj ne estas tiel facile rikolt-eblaj, ili postulas tempon, energion, flegadon kaj precipe pretcon kapti la ŝancon, kiam ĝi prezentiĝas.

De tempo al tempo iu demandas min, ĉu esperanto ankoraŭ vivas, sed... tre malofte kaj certe ne en la rondo de Volontula Agado, aŭ de la kulturasocioj. Tie, eventuale, oni diras "Ho... denove tiuj esperantistoj...".

Ni havas grandan potencialon, kiel esperantistoj kaj kiel Triesta Esperanto-Asocio, unu el la plej malnovaj kulturaj asocioj de nia urbo. Multfoje mi ricevas proponojn pri kunlaborado, bedaŭrinde ne ĉiam eblas akcepti: niaj fortoj ne abundas, ni bezonus pli da aktivaj membroj, prefere junaj kvankam ĉiu povas iamaniere doni sian kontribuon. Ni bezonus instruistojn, ni bezonus iun kiu okupiĝu pri la sidejo, iun kiu flegu la rilatojn kun la membroj, iun kiu traduku tekstojn, iun kiu okupiĝu pri la interretaj paĝoj de TEA, iun kiu..., sed sufiĉas... mi finu la liston ĉi tie, vi mem povas aldoni aliajn bezonojn.

La tempo de nia gravega aranĝo en la monato de majo alproksimiĝas. Poste, ni povos paroli pri ĝi, ĉar ĉia helpo estos bonvena. Por nia Asocio ĝi estas granda defio kaj tasko gravega, malfacila. Se ĉio bone funkcios, se sukceso premios nian laboron, ni fariĝos multe

pli konataj kaj ŝancoj por Esperanto multobliĝos. Ni devas esti pretaj kapti la eblecojn kiuj prezentiĝos, kun la preciza konvinko ke tiu kupto devas trovi konstantan agadon niaflanke, ĉar ĝi ne povas elĉerpiĝi en kelkmonata intensa agado kaj poste, iom post iom, malaperi. Sukceso estos ankaŭ post la Konferenco, se ni kapablos obstine, konvinke, senĉese kaj entuziasme daŭrigi la laboron en plej diversaj kampoj, kun novaj ideoj kaj labormetodoj.

Kiel ofte mi diris, niaj vicoj reduktiĝas pro diversaj kialoj: aĝo, sano, aliaj okupoj. Vizito de niaj kunvenoj estas ege utila por la asocia vivo, por flegi kontaktojn, por interŝanĝo de ideoj kaj preparo de projektoj, kaj absolute necesaj por lingva ekzercado. Ankaŭ en tiu ĉi jarkunveno, mi instigas vin, anstataŭ spekti stultajn televidajn programojn, veni ĉi tien kaj partopreni.

Mi jam tro longe parolis. Estas tempo serioze ekzameni, el kio efektive konsistis nia agado en la pasinta jaro, ĉar malgraŭ ke - laŭŝajne - ni ne multon faris, tamen multego estis farita. Nia senlaca kaj preciza Sekretariino listigos la tuton kaj mi certas, ke pri pluraj programoj vi eĉ ne memoras.

Do, mi finas per la samaj vortoj kiel pasintjare: se ĉiu el ni disponigos al TEA iom da tempo kaj entuziasmo, ni povos realigi multon kaj dank' al tio ebligi al novaj generacioj celebri la 200^{an} datrevenon de la fondiĝo de nia asocio.

Vivu TEA kaj Esperanto!

La prezidanto de TEA,
Edvige Ackermann

Tre estimataj TEA-anoj!

Alia jaro jam staras antaŭ ni kaj en la hodiaŭa tago ni renkontiĝas asemblee por kune rememori la pasintan agadon de TEA. Ni komencu, kiel tradicie, per trarigardo de la diversaj okazintaĵoj.

Februare - Fine de la 4^a Internacia Konkurso pri Kristnasko, okaze de kiu ni ricevis 542 ellaboraĵojn el 12 landoj, oni sendis diplomojn kaj premiojn al la koncernaj partoprenintoj: entute temis pri 56 pak-aĵoj. Bonŝance estis konkursintoj kaj eĉ premiito ankaŭ en Triesto, kaj pli precize en *Aurisina*, tial la 2^{an} de februaro ni iris al la Lernejo "Virgil Ŝček", kie ni renkontiĝis kun 8 instruistinoj kaj 3 klasoj de lernantoj (du el la slovena kaj unu el la itala sekcioj). Nia prezidanto transdonis la premion al la gajnintino, *Anna Battagliarini*, kiu ĝin ricevis pro tre kortuŝa poeziaĵo, kaj al la ceteraj partoprenintoj la diplomojn. Krome estis portitaj ankaŭ donacoj por la instruistinoj, nome libroj kaj KD pri Esperanto, kiujn ili reciprokis per kelkaj libroj pri la historio de tiu lernejo. *Manuel Rovere* el *Udine* gitare ludis kaj kantis (kaj kantigis) belajn italiajn kanzonojn, esperanten tradukitajn. Estis tre bela kaj interesa sperto.

Aŭguste (26-30) – Someraj Karstaj Tagoj. La tre alloga programo titolita: 'Laŭ la spuroj de dinosaŭroj inter Karsto kaj maro' altiris kelkajn interesoitojn. Ni, laŭprograme, faris promenadojn en Valo Rozandra kaj laŭ pado Rilke, vizitis la "Nigran Grotton", kastelon kaj Parkon de Miramare, la paleontologian ejon en la Fiŝkaptista Vilaĝo kaj Naturhistorian Muzeon por konatiĝi kun la dinosaŭro Antono, banis nin ne nur en la maro sed ankaŭ en la rivereto Rozandra. Entute belaj tagoj, en kiuj partoprenis ankaŭ kelkaj TEA-anoj. Ĝuste en tiuj tagoj estis okazinta la 'Festo pri Kulturoj', organizita de *Gabriella Valera Gruber* kunlabore kun la Multkultura Centro 'L'Arca dei Colori' kaj patronita de Literatura Hejmo: kune kun niaj gastoj ni ĉeestis tiun aranĝon, dum kiu Manuel Rovere prezentis kelkajn esperantajn kantojn kaj s-ro Ennio Gerolini parolis pri la triesta dialekto.

Kaj nun pri la rutinaj Enklubaj programoj: tre varia la programoj: eblis spekti fotojn kaj filmojn pri Mongolio kaj Ĉinio, aŭskulti priesperantajn prelegojn, inter alie tiun de Roberto Tresoldi, pri 'Influo de Volapuko sur Esperanto', aŭ tiun pri Hans Jakob, fare de Anita, amuziĝi krucvortumante, aŭskulti la kantiston Manuel Rovere, kaj iom krokodili konversaciante en la triesta dialekto kun Ennio Gerolini, kiu prezentis al ni multegajn terminojn malmulte konatajn kaj precipe nuntempe ne plu uzatajn.

Esperantistaj gastoj en Triesto: dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, Folkmar Koller el Vieno, Zdenka Rojc el Maribor, Eŭgeno de Zilah el Francio, Didier Izacard el Düsseldorf, Antonio de Salvo el Roma, Fany Riznar el Ljubljana/Izola, Roberto Tresoldi kaj la gefrancoj Gabalda, krom du kubanoj, 2 ĉeĥoj, unu hungaro kaj s-ino el Svislando. Ni renkontiĝis ankaŭ kun du francinoj, trapasantaj nian urbon.

Pri kongresoj/konferencoj/renkontiĝoj. Kelkaj TEA-anoj ĉeestis aprile Internacian Esperanto-Konferencon en Wuhan, Ĉinio; maje, kroatan kongreson en Bjelovar kaj julie, la UK-on en

Kopenhago, Danujo. Julie, okazis grava, unu-taga, kunveno ĉe la tre konata esperantistino Anita Altherr, je kies okazo oni festis ŝiajn 60 jarojn de esperantistiĝo, 50 jarojn de UEA-membreco kaj 30 jarojn deponi la eldono de ŝia libro.

27^a de septembro: sekve de invito de Fani Riznar, oni ekskursis al Izola kaj vizitis arkeologian ejon apudmaran.

10^a de decembro: oni iris al Ljubljana okaze de la 90^a datreveno de Esperanto-agado de la loka Societo. La bela programo, konsistanta el prelegoj pri la historio de la movado en Ljubljana, legado de poeziaĵoj, kantoj kaj abunda bufedo, kontentigis la pli ol 40-personan ĉeestantaron. Tiuokaze estis eldonitaj du diversvaloraj poŝtmarkoj, individuaj, kiuj estis tre aprezitaj ĉefe de filatelistoj. TEA transdonis elegantan diplomon kaj plurajn librojn por la loka biblioteko.

Decembre: Edvige Ackermann partoprenis en Seminario, organizita de Kroata Esperanto-Unuiĝo, Zagrebo, kies temo estis: 'Minoraj lingvoj, riĉa literatura kreado', dum kiu ŝi prelegis pri "Literaturo: Kulturo kaj Ekonomio".

Pri ekstera informado:

4^a de februaro: intervjuo ĉe TEA-sidejo pri Esperanto en Triesto kun ĵurnalisto de la loka semajnjurnalo "La voce di Trieste", kiu unuafoje aperis en decembro 2010, nur rete.

22^a de marto/3^a de majo: du intervjuoj de Edvige ĉe Tele4, fare de la ĵurnalisto Viviana Facchinetti, enkadre de la rubriko "El la kofro de l' tempo" (Il Baule del tempo) kune kun Roberto Ive, marte pri Mongolio kaj maje pri Japanio

Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al radioj kaj lokaj ĵurnaloj.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la alirprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 9 elsendoj, pri diversaj temoj esperantaj.

Oktobre: estis publikigitaj, zorge de TEA, en la loka semajna gazeto „Il Tuono“ kelkaj artikoloj pri Karsto, eltiritaj el la libro "Giro turistico del Carso Triestino" ree eldonita de s-ro Valle por TEA.

Pri ĝeneralaj asociaj informoj: Konstante kaj pli-malpli akurate, ĉiun duan monaton TEA-Bulteno atingas vian hejmon, ĉiun rete ĉu perpoŝte. Ĝia redaktanto, komence de 2011, kontaktis la aŭtoron de tre interesa libro, kies titolo estas 'Imbarazzismi' (Embarasismoj) kaj kiu prezentis la diversajn aspektojn de vivo de enmigrintoj, por ricevi permeson pri tradukado de kelkaj anedoktoj. D-ro Kossi Amekowoyoa Komla Ebri tre volonte ĝin donis kaj 3 rakontetoj aperis en sinsekvaj numeroj de TEA-Bulteno.

Decembre: TEA ricevis donace de UEA, pere de Biblioteka Apogo Thorsen, librojn je valoro de 100 eŭroj: laŭ nia peto, ni ricevis la trivoluman "Ĉe Akvorando", ĉinan verkon en la traduko de Laŭlum kaj "Tuj apude", gvidilon tra la kvartalo de la CO en Roterdamo, verkita de H. Tonkin.

Danke al interesiĝo de s-ino Ackermann, oni sukcesis pere de s-ro Daminelli kaj UECI havigi kroman monhelpon al Jean Paul Alexis, la prizorganto de la orfejo en Goma, R.D. Kongo.

Kaj per ĉi informo mi finas la raporton.

Edele Doerflinger



GRAVA EŬROPA KONFERENCO EN TRIESTO KUN ESPERANTO KIEL UNU EL LABORLINGVOJ



Eŭropa Esperanto-Unio ricevis subvenciojn de Eŭropa Unio el la rimedoj de Aktiva Civitaneco de Eŭropanoj por projekto organizi eŭropan konferencon pri la temo "Kia estus Eŭropo nun, se ne ekzistus EU?". Kiel videble, la konferenco teme neniel rilatas al Esperanto, sed la organizanto aplikos reĝimon de tri laborlingvoj inter kiuj Esperanto. Pro la interesa temo EEU sukcesis varbi tre gravajn personecojn de eŭropa politiko kaj scienco kiel eksprezidenton de Jugoslavio kaj Kroatio Stjepan Mesić, Slovenian eksprezidenton Milan Kučan, antaŭan estron de kristandemokrataj partioj en Eŭropa Parlamento Thomas Jansen, nobelpremiiton Reinhard Selten ktp. La konferenco celas pensigi Eŭropanojn pri la rolo de EU en la ĝisnuna historio, aparte en sia rolo konservi la pacon, pri kio eŭropanoj malmulte konscias. Tial la ĉefa celpubliko estas junaj ĵurnalistoj kaj studentoj de ĵurnalismo, kiuj povos poste la rezultojn de la konferenco disvastigi en siaj landoj. Kompreneble ĝi estas malferma ankaŭ al aliaj homoj, sed aparte al esperantistoj, kiujn la temo interesas, ĉar gravas montri al la partoprenantaj gravuloj kaj ĵurnalistoj, ke ekzistas ankaŭ multaj esperanto-parolantoj kiuj estas kompetentaj pri la temo kaj povas same bone uzi Esperanton rilate neesperantistan temon, kiel aliaj uzos la du aliajn lingvojn (italan, anglan).

La konferenco okazos inter la 9^a kaj 11^a de majo en Triesto en la Salono Beethoven (*Via del Coroneo*

15), kie sian sidejon havas ankaŭ la loka organizanto: Triesta Esperanto-Asocio. Ne estas aliĝkoto, sed oni devas laŭeble rapide aliĝi por povi rezervi hotel-ĉambrojn. Por la junaj esperantistaj ĵurnalistoj estas disponebla subvencio: la organizantoj pagos la tranoktadojn en Triesto.

Fakultatoj pri ĵurnalismo en Zagreb, Zadar, Koper, Ljubljana kaj Triesto promesis partoprenon de grupoj da studentoj gvidataj de siaj profesoroj. Por ili la konferenco estos aparte interesa, ĉar, post ĉiu serio de prelegoj, estos unu-du-hora laborgrupa aktivado, dum kiu la studentoj, disdividitaj je 4 subgrupoj, simulos diversajn supozitajn situaciojn en EU kaj, iasence ludante, disvolvigos diversajn tezojn, certe interesajn por postaj studoj. Tiuj kvar grupoj uzos bedaŭrinde nur la anglan, sed kompense funkcios ankaŭ 5-a grupo en kiu nur Esperanto rolos kiel laborlingvo. Prelegoj estos interpretataj en du pliaj lingvoj, do se iu prelegos angle, oni interpretos en Esperanto kaj la itala.

Paralele kun la konferenco en Triesto okazos ankaŭ konferenco de Alp-Adriaj esperantistoj, kiuj povos ĝui la konferencon kaj poste partopreni en aparta programo dediĉita nur al ili.

Pliajn informojn eblas ricevi, se oni skribos al:

europaesperantounio@gmail.com

aŭ al noredv@teletu.it.

El Eŭropa Bulteno, Zlatko Tišljar

Jen la programo

9-a de majo, merkredo

11,00-12,00: Konferenco por italaj ĵurnalistoj

15,00-16,00: Solena Malfermo, kun enkondukita parolo de Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

Historia branĉo

16,00-16,30: Thomas Jansen.
(NB: post ĉiu 20-minuta prelego sekvas 10-minuta diskuto kun la publiko).

16,30-17,00: Božo Repe, profesoro pri historio en Ljubljana

17,00-17,30: kafopaŭzo

17,30-18,15: diskuto pri historia perspektivo de EU

18,15-20,00: **Laborejoj por partoprenantoj** (ĉefe junaj ĵurnalistoj kaj studentoj de ĵurnalismo, sed ankaŭ partoprenantaj esperantistoj) pri la historiaj aspektoj de la ĉeftemo

10-a de majo, ĵaŭdo

Politika branĉo

09,30-10,00: Stjepan Mesić

10,00-10,20: Milan Kučan, (ne

ankaŭ konfirmita)

10,30-11,00: Itala Politika Reprezentanto

11,00-12,30: aliaj prelegantoj (Giorgio Novello, Margareta Handzlik,...)

Sekvas diskuto pri politika perspektivo de EU

12,30-14,00: tagmanĝa paŭzo

14,00-15,30: **laborejoj por partoprenantoj** pri la politikaj aspektoj de la ĉeftemo

Ekonomia branĉo

15,30-16,00: Reinhard Selten

16,00-16,30: Francois Grin, svisa universitata profesoro.

16,30-17,00: kafopaŭzo

17,00-17,30: Mladen Staničić, ekonomika fakulo el Kroatio.

17,30-18,30: diskuto pri ekonomia perspektivo de EU

18,00-19,00: Publika Ronda tablo por Triesta publiko kun la eks-prezidentoj Mesić kaj Kučan, Margareta Handzlik kaj Thomas Jansen pri la graveco de EU por konservo de la paco en Eŭropo

kaj la mondo.

18,30-20,00: **laborejoj por partoprenantoj**

11-a de majo, vendredo

Aliaj prelegoj

09,00-9,40: prof. Paolo Alessi, Prezidanto de Centro Unesco de Triesto, pri "Eŭropo kaj problemoj de handikapitoj"

9,40-10,10: Zlatko Tišljar prelegas pri la identeca karaktero de lingvoj

10,10-10,40: alia prelego, ankaŭ difinenda

10,30-10,40: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,40-11,10: kafopaŭzo

11,10-12,00: Eventualaj aliaj prelegantoj

12,00-13,30: Ferma plenkusido pri konkludoj de la konferenco: parolado de Seán Ó Riain pri la konferenco kaj konkludoj, eventualaj intervenoj de homoj intertempe aliĝintaj kaj gravaj, kanto de eŭropa himno, fermo de la konferenco.

16^a Konferenco de Alp-Adriaj Esperantistoj

Post partopreno en la Eŭropa Konferenco, posttagmeze de la **11^a de majo**, amika kunestado kaj je la 19^a horo, komuna festa manĝo. **12^a de majo** - Asembleo de la Alp-Adriaj grupoj kaj diskuto pri la temo "**ALP-ADRIA LABORKOMUNUMO, PLUA EŬROPA ENGAĜIĜO**". Post tio, per la motorŝipo *DELFINO BLU* al *Muggia*, vizito de la urbeto. Fina tostado kaj ĝisrevidoj. Aliĝilojn petu al noredv@teletu.it aŭ testudo.ts@gmail.com.



JOTA

Nun mi prezentas al vi la supon *Jota* kiun prefere oni manĝu dumvintre. Estas diraĵo en Triesto, laŭ kiu, se iam *jota* ne plu ekzistos, tiam eĉ ne triestanoj ekzistos!

Laŭ diversaj aŭtoroj, ties nomo devenas aŭ el terminoj cimbra (*yot*), aŭ malnovlatina (*jutta*), el irlanda (*it*), aŭ eĉ eble el ĉeĥa (*juĉa*). Entute temas pri plado tre komuna, ofte surtabligita ĉe ĉiuj familioj, tiom ke la vorto *jota*, ankoraŭ nuntempe, estas uzata kun la signifo de "manĝo abunda". Ŝajnas, ke la origino de tiu ĉi supo estas ĝuste triesta, malgraŭ ke kaj slovenoj kaj friulanoj kontraŭdiras tiun aserton kaj pretendas la aŭtoran rajton. Ĝi estas fama tra la tuta regiono kaj, laŭ la diversaj kutimoj, oni aldonas al ĝi sian apartan "spicon", kvazaŭ por pravigi ties aŭtor-econ. Tial eblas gustumi *Jota*-n kun acidaj rapoj, kun maisa faruno (*formenton*), laŭ karsta maniero kun hordeo ka.

Jen la originala recepto:

Ingrediencoj por 4 personoj:

- 300 g da sekigitaj fazeoloj (brunaj)
- 300 g da acida brasiko
 - 1 laŭra folio
 - 2 ajleroj, dispremitaj
 - 2 mezgrandaj terpomoj
 - 1 kulero da olivoleo
 - 1 ajlero (por la fritetaĵo)
 - 2 kuleroj da faruno
- salo kaj pipro, laŭbezone

Trempadu la fazeolojn tutan nokton en malvarma akvo. Metu ilin en poton kun malvarma, sensala, akvo kune kun la laŭra folio kaj la dispremitaj ajleroj. Kuiradu ĝis ilia moliĝo. Intertempe, metu iom da olivoleo en alian kaserolon, aldonu la acidan brasikon, salu, surmetu kovrilon kaj kuiretu je tre milda varmeco. De tempo al tempo miksetu, zorgante ke la brasiko ne tro sekiĝu aŭ adhe-ru al la kaserolo. Se bezonate, aldonu iom da varma akvo. Post ĉirkaŭ 1 horo-1 horo kaj duono, kaj brasiko kaj fazeoloj estos finkuiritaj.

Tiam en pato varmigu oleon, enmetu ajleron hakitan kaj ĝin blondigu: tiam enmetu la du kulerojn da faruno, kaj daŭre miksante, ĝin brunetigu. Post tio enverŝu la preparitaĵon en la poton kun la fazeoloj. Aldonu, je ĉi punkto, ankaŭ la kuiritan brasikon kaj la terpomojn, senŝeligitajn sed ne dispecigitajn, salon, laŭ via gusto, kaj finkuiru je malalta varmeco. Fine, elprenu la terpomojn, kaj ilin kaĉigu; post tio denove ilin enmetu en la *jota*-n. Preferindas, ke ĉi tiun supon oni surtabligu la postan tagon. Por fari el ĝi kompletan pladon, oni povas aldoni pecon da ŝinko, aŭ kolbasetojn aŭ fumaĵitajn porkripetojn.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa ttt-ejo: [//it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina](http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina) - www.esperantotrieste.it
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Estas iu konata proverbo, laŭ kiu: "kiu silentas, tiu konsentas", konsekvence mia konscienco tran-kviliĝis. Nenian malaprobajn komenton mi estis ricevinta ekde la apero de tiu ĉi rubriko, tial mi daŭrigas proponi al vi interesajn kvizojn pri kono de triestaĵoj! Jen la ĉifojaj cerbumigadoj:

1. Ĉu vi konas la originon de tiu kanto "L'omo vespa" (la homo-vespo), nome tiu suspektinda fiulo, kiu trairadis nokte la triestajn stratojn, kaŝ-kovrita per longa, nigra mantelo kaj armita per pikilo, en la unuaj monatoj de 1932a jaro?
2. Kio estas "rebechin"? (elp. rebekin)
3. Kiu estas la origino de la nomoj de la du bron-zaj statuoj, kiuj, ekde 1517, anoncas la tempo-pason per martelbatoj sur la sonorilon, nun starantaj sur la urbodoma tureto?
4. Ĉiam en Placo Unuiĝo de Italujo (*Piazza Unità d'Italia*): kion reprezentas la du fontanoj, starigitaj flanke de la impona renesanc-stila Palaco *Lloyd*, konstruita inter 1881 kaj 1883, laŭ projekto de arkitekto *Heinrich von Ferstel*, kiel simbolo de la triesta, surmara, potenco?

Nur se vi estas tiel embarasita kaj malkapabla doni la korektajn respondojn, vi rajtas iri al la 5^a paĝo kaj legi ilin. Atentu, ke mi vin kontrolas!!!

Kaŝita proverbo

Jen la lasta vortludo de nia amiko VIGLO
Ĉifrita per malkovronta kodo, kaŝitas la esperanta traduko de ĉarma araba proverbo.

**ROPOTNIĜIMANEDADGA
BENSATSEAMISKORPLAM**

Solvonto, kompreneble, ricevos interesan premion! Se estos nombregaj la korektaj respondoj, ni lotumos. Do, vi klopodu, aŭ, pli bone dirite, kiel invitas nia nelacigebla kviz-faranto Viglo: 'Cerbumu, cerbumu'!

Limdato de alsendo de solvo estas la fino de aprilo! Bonan amuziĝon!



En Triesto: Esperanto ĉe Alirprogramoj de RAI UNO


| | |
|------------|--|
| 13/04/2012 | h. 14.50 - Niaj programoj dum printempo 2012 |
| 21/05/2012 | h. 14.50 - La katolika Esperanto-Movado |
| 20/06/2012 | h. 14.50 - 9 minutoj kun... |

Se vi havas ideojn aŭ taŭgajn temojn proponindajn al la aŭskultantaro, Edvige estas je via dispono!

Atentigo. Pro la amaso da laboroj rilataj al la organizado de la Konferenco (vd. 3^{-an} paĝon), la venonta TEA-Bulteno tutcerte aperos kun [ega](#) malfruo, supozeble fine de majo. Mi jam nun petas pardonon al la legantaro. Elda

Respondoj al demandoj pri Triesto:

- 1) *Flaminio Cavedali* estis ĵurnalisto de la loka tagĵurnalo "Il Piccolo" (La Malgrandulo), kiu raportis, per pluraj artikoloj, la fifarojn de tiu krimulo, ĝis komenco de aprilo 1932, kiam



abrupte ĉesis liaj atakoj. *Cavedali*, krom esti tre sagaca kaj ironia skribisto, estis ankaŭ aŭtoro de pluraj, tre konataj, dialektaj kanzonetoj tiuepokaj. Tial li adaptis al marŝ-similaj popolmuzikaĵoj kelkajn strofetojn, prilaudantajn la "glorajn agojn" de la homo-vespo. Jen nur la komenca parto, en la traduko de nia TEA-anino Anita Altherr:

De San Ĝiakomo al Rojan'
min postkuris huligan',
mian pugon li pikadis kun elan'.
Vidu, rapide iras la knabino } Bisi dufoje
de la pikulo ŝi havas timon.

- 2) Temas pri postlasaĵo de la aŭstra-hungara periodo, nome tipa manĝeto, servata en la triestaj bufedejoj, kaj al laboristo ĵus malsupriĝinta de la skafaldo kaj al sinjorino, surhavanta elegantan vizonan pelton antaŭ ol iri al Operejo, sed ankaŭ al studentoj kaj pensiuloj. La vorto plej probable devenas el ree "beki", duan fojon manĝeti post la frumatena manĝo aŭ iom antaŭ la vespera.
- 3) Tro facila demando, eĉ eksterlandaj vizitintoj scipovas respondi! La popolanoj, ekde ilia apero, ilin baptis: *Micheze* kaj *Jacheze* (elp. Mikece kaj Jakece), plej verŝajne dialektigo de la nomoj *Michele* (mikéle) kaj *Giacomo* (ĝiako-mo) el la slovenaj *Mihec* kaj *Jakec*.
- 4) Unu estas Tetiso, mar-diino, patrino de la Oceanidinoj (maldekstraflanke), verko de skulptisto *Giuseppe Pokorny*, kaj la alia Venuso, diino de beleco kaj amo, skulptita de Ugo Haedti. Tetiso estas la mita gardistino de la dolĉaj akvoj, dum Venuso, de la maraj. Origine, fakte, el la maldekstra fontano eliĝis trinkebla akvo kaj el la dekstra, danke al pumpila sistemo, mara akvo.

Printempa Semajno en Gresillon

13-21 aprilo 2012

Seminaria temo: Mondovojaĝantoj

Animantoj: Mireille Grosjean, svisino loĝanta apud La Chaux-de-Fonds, Svisujo, kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj Miguel Ángel González Alfonso, kubano loĝanta en Havano, prezidanto de la Esperanto-klubo "La Najbaroj". **Instruantoj:** Christophe Chazarein, franco loĝanta en Tuluzo, Francujo kaj Zsófia Kóródy, hungarino loĝanta en le Esperanto-urbo Herzberg am Harz, Germanujo.

Pluajn detalojn kaj aliĝilojn oni trovas rete:

gresillon.org/printempo

| Marta Programo | |
|-----------------|--|
| 2 vendredo | 20h00 - Ludovikitaĵoj |
| 5 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 6 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 9 vendredo | 20h00 - Secesia arkitekturo en Prago: fotoj de Elda kaj Pino |
| 12 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 13 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 16 vendredo | 20h00 - Poezio en la patrinaj lingvoj |
| 19 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 20 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 23 vendredo | 20h00 - 'Triesta dialekto' - konversacio kun Ennio Gerolini |
| 26 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 27 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 30 vendredo | 20h00 - "Londono, ĉefurbo brituja" - fotoj de Erica kaj Alan |
| Aprila Programo | |
| 2 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 3 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 6 vendredo | 20h00 - El la virtuala esperantista mondo! |
| 8-9 | Bonan Paskon! |
| 10 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 13 vendredo | 20h00 - Preparlaboroj por Konf. |
| 16 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 17 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 20 vendredo | 20h00 - Preparlaboroj por Konf. |
| 23 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 24 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 27 vendredo | 20h00 - Preparlaboroj por Konf. |
| 30 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| Maja Programo | |
| 1 mardo | Festotago |
| 4 - 7 - 8 | PREPARLABOROJ POR KONF. |
| 9-10-11 kaj 12 | Eŭropa Konferenco kaj 16^a Alp-Adria Konferenco |
| 14 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 15 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 18 vendredo | 20h00 - Pri ĵus finitaj Konferencoj |
| 21 lundo | 18h30 - Unua-gradaj kurso |
| 22 mardo | 17h30 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| 25 vendredo | 20h00 - 'Triesta dialekto' - konversacio kun Ennio Gerolini |
| 28 kaj 29 | Unua- kaj dua-gradaj kursoj |

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2011 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320